

PRI NIAJ AKTOROJ - KAJ PRONONCADO

Membroj de la Familio Bonvolo:

Georgo (la patro): - Miko Sloper, la direktoro de la centra oficejo de ELNA dum la filmado, estas sperta aktoro kaj kantisto. "Ah, he, kio?"

Filisa (la patrino): - Leonora Torres venis al ni el Meksiko por la 5 someroj dum kiuj ni filmis la reklamfilmon kaj la 15 lecionojn. Ŝi estis prezidanto de la Meksika Esperanto Fondaĵo dum tiu tempo. Ŝi scias nur iom da la angla kaj nur per la helpo de la aliaj Esperantistoj ŝi povis trakti la direktadon de la profesiuloj kiuj faris la filmadon. Ŝi estis studinta dancarton, kaj certe estis patrino kaj maturigis infanojn.

Jolanda (la plej aĝa filino): - Mingchi Chien (Carroll) venis al ni el Ĉinio, kie ŝi estis instruisto de Esperanto, kiel evidentiĝas en ŝia majstra rolado kiel la juĝisto.

Helena (la plej juna filino): - Ĵenja Korp (Bondelid) estis finanta sian ĉefstudon en universitato en Esperanto, kaj devis ludi rolon kiu ne estis eĉ iom simila al ŝia propra personeco.

Karlo (la filo): - Stephan Boddington, bird-amanto el Eŭropo, ĝuis esti inter ni tiom ke li ofte revenis por vizitoj.

ALIAJ ĈEFAKTOROJ

Ruselo : (ŝafisto el Novzelando): Guy Menahem, talentoplena, entuziasma junulo kun impeto sukcesi - nun advokato en Novjorko, kaj fine li perdis sian proŝminkaĵan akneon.

Ken - (raportisto el Japanio): Katsunori Syozi, kiu diligente rolis kiel raportisto. Ken estas estonta Japana industrialisto. La familio Syozi estas tre aktivaj en Esperanto-aferoj en Japanio kaj internacie.

Flora Bundo: - (frustrita butikisto): Vesna Rogulja Heyman, "denaska" Esperantisto el Kroatio kiu venis al ni pro edziniĝo, kaj surprizis nin ĉiujn per sia kaŝita talento kiel aktorino. (Ŝi estis certa, ke ŝi ne povus fari tion, kion oni anticipis de ŝi!) Sed ŝi sukcesis, kaj vere skuis nin per ŝia vortoj "Mi svenas, mi falas, mi mortas."

Detektivo: (li neniam eĉ gajnas nomon - escepte se vi volas nomi lin "difektito") Steve Wagenseller, instruisto, kantisto kaj nia plej sperta aktoro, el Havajo. Li estis nia humora "malbonulo" kiu ridigis nin kiam aferoj estiĝis streĉaj. La trejnita voĉo multe helpis.

Doktoro: - (okupata, sed helpema kuracisto) Amalie Maria Johansen, alia "denaska" Esperantisto el tuta familio da parolantoj de la internacia lingvo en Danujo.

Nina: - (atletino/ekaktorino) Natsuko Takenaka (Fujimoto) venis al ni el Japanio por "savi" Karlon kaj klarigi gramatikon al la "prezidanto de la akademio."

Aziz: - (impost-kolektanto) Aziz Diallo venas al ni el Senegalo, kie li lernis Esperanton kun eta Franca akĉento.

Bardo: - (la "kuzo" de Ruselo) kies muzika talento "savas" Helenan kaj multe almetas al nia Esperanta muzikaro!

kaj Elsa: - (instruisto) Elsa Torres venis al ni el Kubo, kun ŝia granda sperto pri laŭtleĝado de Esperanto por Radio Havana. Kiom bonŝancaj ni estis, havi ŝian profesion prezentadon. Kiu povus trovi pli bonan instruiston?

KIO PRI PRONONCADO?

La prononcado de la aktoroj estas ja ĝenerale akceptebla, sed iliaj etaj naciaj akĉentoj montras, ke Esperanto estas tute komprenebla spite al la diversaj akĉentoj kiuj ekzistas en la mondo. Plue, ili preparas nin por tio, kion ni aŭdos ĉe la Universalaj Kongresoj!
Ĝuu!



FILISA



GEORGO



DOKTORO



AZIZ



HELENA



JOLANDA



KEN



RUSELO




KARLO



FLORA



NINA



... KAJ LA ŠAFO!



DETEKTIVO



BARDO



LA FAMILIO BONVOLO